

BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.—SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—MARTO 1913.—N^o 3 (9)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Malgraŭ. — *Projekto de unugrupo*, Jozefo Grau.

GRUPAJ AFEROJ

La nova Komitato. Laŭ nia regularo ses membroj de la Komitato devis je la komenco de la jaro ĉesi en siaj oficoj. La ĝenerala kunveno de la Grupo, kiu okazis la 28^{an} de Januaro, elektis iliajn anstataŭantojn. La oficoj en la nuna Komitato estas konfiditaj al la sekvantaj gesinjoroj:

Prezidanto, Sro. Stefano Rey; *Vicprezidanto*, Sro. Jozefo Grau; *Sekretario*, Sro. Johano Puig; *Vicsekretario*, Sro. Ramono Pérez; *Kasisto*, Sro. Mariano Pascuet; *Kalkulistino*, Fino. Rozo Cortés; *Bibliotekisto*, Sro. Petro Navas; *Gemembroj*, Finoj. Laura Sánchez, Konceptio Puig; Sroj. Jozefo Carcereny, Bernabe Mira, Estanislau Pellicer, Antono Viñals.

Konkurso por niaj lernantoj. — La 18^{an} de Marto havos lokon la ekzameno de niaj lernantoj partoprenantaj en la anoncita konkurso. La Juĝantaron konsistigos Sroj. Rey, Pujolà, Pellicer, Gili kaj Grau. La ekzamenatoj devos fari la sekvantajn ekzercojn: Legi la duonon de unu paĝo el la Krestomatio. Traduki skribe, sen helpo de ia libro dum 30 minutoj, 5 frazojn katalunajn. Respondi al kelkaj demandoj pri gramatiko.

Kiel ni diris, al tiuj, kiuj elmontras plej grandajn konojn pri Esperanto, estos aljuĝitaj tri premioj valoraj je 15, 10 kaj 5 pesetoj. Ĉiuj lernantoj, kiuj ĉeestas la kursojn en nia societo, rajtas partopreni en la Konkurso.

Adiaŭo. — Niaj fervoraj samgrupanoj Sroj. Delclós kaj Guixà la 1.^{an} de Marto forlasis nin, komencinte sian militservon. Por montri al ili la ĉies simpatian la 16^{an} de Februaro kvardeko de niaj geanoj regulis ilin per amuza ekskurso al la Fonto de Sant Ciprià, bele lokita en valo ĉe la ĉirkaŭurbaj montoj. Gajeco regis dum la tuta irado kaj kortuŝaj tostoj vidigis al la regalatoj forveturontaj la bedaŭron kaj amikecon de iliaj kunsocietanoj. Baldaŭan revenon inter nin, karaĵ amikoj!

Kurso. — Nia distinginda kungrupano Sro. E. Pellicer, diplomita profesoro de la K. E. F., prenis sur sin la taskon konduki la praktikan

kurson, kiu ĝis nun gvidis Sro. Grau. La kurso okazas ĉiujn mardojn, ĵaŭdojn kaj sabatojn de 9.^a ĝis 10^a vespere, en nia sidejo.

Festoj. — Krom la vizitoj, pri kiuj ni raportis en la pasinta n.^o de la BULTENO, estas en preparo granda vesperfestoj, kiuj havos lokon ĉe la mezo de Aprilo. Ni esperas, ke ĝi estos brila festo. Detalojn ni donos per la venonta numero.

Gazetoj ricevitaj intersaŭge. — «La Ondo de Esperanto», «Kuraĉistoj», «Panonio», «Brazila Esperantisto», «Ĉasopis Ĉeskych Esperantistů», «Hungarlanda Informilo», «Normanda Stelo», «Belga Esperantisto». Al ili ĉiuj plej sinceran dankon.

Kion patrino povas suferi, originale verkita de Hendrik Conscience en flandra lingvo. Esperanta traduko de Frans Schoofs. Prezo: 20 sp. — Fr. 0'50.

Ni donace ricevis tiun interesan libron verkitan en bona Esperanto; koran dankon! Karaj samsocietanoj, aĉetu ĝin!

MALGRAD

PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

La venontan monaton en nia *Bulteno* ni komencos publikigi la projekton de regularo por unuiĝo de la grupoj barcelonaj, prezentita antaŭ la delegitoj en la kunsido, kiu okazis la 23^o de Januaro. La komisiono, kiu ĝin prilaboris, presigos nur la regulojn rilatantajn al la unua periodo de unuagrupiĝo.

Tiuj, kiuj rilatas la duan kaj trian periodojn, estos prezentataj, kiam la por la unua periodo reguloj estos tute fiksitaj, kaj la grupoj estos ilin akceptintaj. Tiam, se la rimarkoj, kiujn oni faris kaj akceptis por la regularo de la prova periodo, ĝin esence aliformigis, ilian spiriton oni povos enigi en la regulojn por la sekvantaj periodoj, pri kiuj jam ne zorgos la runa komisiono, sed la organiza komitato, kiu la grupoj elektos.

- Ni supozas, ke al ĉiuj barcelonaj samideanoj plaĉas la demokra-tema agado de la membroj de la komisiono, kiuj penas trovi la mezan punkton, ĉe kiu la diversaj opinioj renkontiĝas. Tamen ili petegas ĉiujn, kiuj ne aprobas ilian agadmanieron, bonvola esprimi sian sinceran opinion, kaj se necese ili tial sanĝos aŭ modifos sian procedon. Oni ne forgesu, ke la devizo de la okazaj organizantoj (la projekto kaj ĝia rezultato estas nenies propraĵo) estas: Memorigi ĉiun pri ĉio kuniganta; klopodi eviti ĉion, kio povas kaŭzi disigon.

Ĉu oni ne oferos siaflankajn vidpunktojn kaj opiniojn, — kiuj ofte estas nur esprimo aliforma de la opinioj de la ceteraj samideanoj, — por profiti je la bonoj de granda organizaĵo komune starigita? La diroj de multaj barcelonaj esperantistoj antaŭcertigas pri la sukceso de la komencita entrepreno, kaj ni esperas, ke oni ne rifuzos fari pro konkordo la malgrandajn oferojn, kiuj montriĝos necesaj.

La progreso de Esperanto ĉe ni estos la rekompenco.

JOZEFO GRAU